Enestas:

Meteologia Terminaro

# JARLIBRO

**1961**

**DUA PARTO**

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C O.)

## METEOLOGIA TERMINARO

### Antaŭparolo

La ĉi-supra titolo kaŭzis al mi iom da embaraso, ĉar mi timis ke ĝia leganto unuavide povos supozi ke pro preseraro du literoj estis ellasitaj el la vorto "Meteorologia". Mi do dekomence volas konfirmi ke tiu ellaso estas intence farita kaj klarigi la kialon.

La termino 'METEORO' komence signifis ĉiun-ajn enatmosferan fenomenon, kio inkluzivis kaj enspacajn korpojn kaj precipitajn, elektrajn aŭ lumajn fenomenojn. Sed dum la lasta jarcento ĝi estiĝis uzata precipe por korpoj, ŝtonoj aŭ eĉ sableroj vagantaj tra la kosma spaco, iam forbrulantaj en la supra atmosfero kun videblaj lumaj trenaĵoj (bolidoj), iam falantaj teren (aerolitoj). "Meteorologio" konsekvence signifu studon pri tiaj fenomenoj. Por la ceteraj atmosferaj okazaĵoj, kiuj aŭ influas la veteron kaj klimaton, aŭ estas de ili influataj, kiel pluvo, fulmo miraĝo, mi do proponas la neologismon 'METEO'. Tiel en la scienco "Meteologio" ni traktas pri lumometeoj, meteogramoj (G : Meteogramm), Meteostacioj (F : meteo) ktp. La termino "metea" ripetiĝas ofte en ĉi-tiu verko kaj mi esperas ke fakuloj trovos ĝin konvena por uzado.

Mi komencis ĉi tiun verkon en formo de angla-esperanta vortaro, sed post kelka pripenso mi decidis doni al ĝi la nunan formon de tutesperanta terminaro, por fari ĝin kongrua kun la Plena Vortaro kaj la Scienca kaj Teknika Terminaro, el kiuj verkoj mi ĉerpis multajn fakterminojn kaj difinojn.

Tiujn mi indikis per la literoj (PV) kaj (S). Sed por limigi la disponeblan spacon mi tenis la difinojn laŭeble mallongaj kaj rilatigis ilin specife al Meteologio, sen intenco larĝigi ilin por vastscienca aplikado. Fakterminaro ja ne pretendas esti studlibro.

Okaze mi devis malkonsenti pro diversaj kaŭzoj kun la supre cititaj fontoj kaj tion mi indikis per la vortoj : (ne rek.).

Ĉar Meteologio havas mondskalan aplikadon, ĝia nomenklaturo evoluis paralele en la diversaj mondlingvoj sur la bazo de latino-grekaj radikoj, kaj tiun tendencon mi devis sekvi, esperantigante laŭeble la akceptitajn esprimojn per simpligo de ilia literado. Tamen kiam ajn

ĝi aperis farenda, mi kreis por ili esperantradikajn sinonimojn, kaj kunigis la parojn per la signo =

Mi penis trakti la sinonimojn egalvalore, kaj vicigis ilin en la alfabeta ordo, pro kio kelkaj difinoj okazas dufoje en la Terminaro. Mi lasas al la estonta uzado en la faka literaturo la decidon kiu ero el la paro estos preferata.

En diversaj kazoj estas nerekomendinde transpreni ĝenerale akceptitajn internaciajn terminojn sen ŝanĝo, ĉar en Esperanto ili montras tute aliajn signifojn, kio povus okazigi konfuzon, — ekz : radaro, aerostato, aerolito k.a. Mi tamen ne kuraĝis elimini ilin entute, mi nur rekomendas doni preferon al iliaj sinonimoj. Nur en malmultaj kazoj mi enkondukis etajn ŝanĝojn de literado, ekz. arajometro (anst. areometro), boleometro (anst. bolometro) k.a.

Restis tamen multaj terminoj por kiuj neologismoj aperis la ĝusta solvo, kaj tiujn mi enkondukis en espero ke la fakuloj kaj la Akademio aprobos ilin. Mi indikis ilin per la litero (N).

Eble unu paro de tiuj neologismoj estas ĉi tie menciinda. Por indiki la kompasajn direktojn mi proponas la neologismojn "Eosto" kaj "Vestro", anstataŭ "Oriento" kaj "Okcidento", tial la kvar kompasaj flankoj havu simbolojn N., S., E., V. similajn al la internacia uzado. La novaj vortoj ankaŭ estos pli klare aŭdeblaj dum parola signalado inter maristoj. La terminoj "Oriento" kaj "Okcidento" retenos siajn nociojn rilatajn al kulturo, popolo, lingvo, k.t.p. laŭ difinoj donitaj en la Plena Vortaro.

Sekvante la metodon de la Scienca kaj Teknika Terminaro mi ofte aldonis en parentezoj nacilingvajn tradukojn en la angla, franca, germana kaj latina lingvoj kaj indikis ilin per la literoj "A", "F", "G", kaj "L".

Ĉi tiun laboron antaŭ kelkaj jaroj iniciatis S-ro E. D. Durrant, kiu preparis du-lingvan Angla-Esperantan Vortareton, sed bedaŭre pro malsaneco kaj trookupateco li devis ĉesiĝi ĝin; li transdonis al mi la materialon, kiun mi laŭeble uzis. Krom tio mi ricev,is valoran helpon en la Esperantigo de anglaj terminoj de S-roj Butler, Francis, D-ro Bean, kaj D-ro Osborn, ĉiuj el Britujo, ankaŭ de D-ro Happach, Germanujo, Prof. Popoviĉ,



Jugoslavio, kaj de aliaj esperantistoj. La verkon en ĝia nuna redakto kontrolis Inĝ. Isbrucker, Nederlando, rilate al lingvo, meteologoj Knecht, Maroko kaj Ivanov, Sovetunio kiuj tre detale trastudis la tekston, kaj korektis multajn fakajn difinojn. Al ĉiuj menciitaj personoj mi esprimas elkoran dankon, sen ilia helpo ĉi tiu terminaro ne povus estiĝi.

Tamen mi portos la tutan respondecon pri la nun prezentata verko, kaj esperas ke ĝi servos por pliriĉigi nian terminologian trezoron.

Maurice Lewin

A

**Abako**: kalkulhelpa instrumento
**Ablacio** (N): konsumiĝo de glacisurfaco kaŭzita de vento kaj pluvo
**Adiabata** (S): termoŝanĝa, sen ŝanĝo de kaloro kun la ekstera medio
**pseŭdo~a**: kurblinia termoŝanĝo rilata al humido
**Advekcio** (S): horizontala alfluo de aeramaso tra reto da izotermoj (kp. konvakcio)
**~a nebulo**: nebulo kaŭzata pro interago de diversvarmaj aerfluoj
**Aero** (PV): atmosfera gaso, ankaŭ pseŭda prefikso pri atmosfera tavolo
**~premo normala**: 1013 mb ĉe marnivelo, varia laŭalte
**~denso**: specifa maso de la aero (en unuo de volumeno)
**~denso balistika**: meza denso laŭlonge de trajektorio
**~grafo**: registrilo de pluraj meteoj
**~ostato = balono**: gasplena ŝvebanta ŝtofa aŭ kaŭĉuka sako
**~olito** (PV): meteorŝtono falinta teren el kosma spaco (A: meteorite)
**~solo** (N): mikroskopaj solideroj kaj fluideroj en la atmosfero
**~kavo**: malvasta konvekcia aerspaco sentebla dum aviadila flugo
**~fluo**: regula, nenecese horizontala aermoviĝo
**~flua vojo**: linio de aerfluo
**~gliso**: kliniĝa aerfluo
**~a rezisto**: komplekso de aerfortoj (precipe frikcio) agantaj kontraŭ la movado
**Aeramaso**: vasta, samdevena aerkvanto moviĝanta unudirekten
**~a analizo**: diagnozo de sinoptika ~a evoluo
**~a transformiĝo**: ŝanĝiĝo de fizikaj kvalitoj de aeramaso
**~a klimatologio**: studo pri ofteco kaj karaktero de ~oj
**~aj tipoj laŭdevene**: polusmara (PM) poluskontinenta (PK), tropikmara (TM), tropikokontinenta (TK), sendifina (X), arkta (A), ekvatora (E)
**Aerodinamiko**: branĉo de mekaniko pri aerfluoj
**~a turbulento**: neregula aerfluo
**Aerologo**: spertulo pri altaj aertavoloj; (aparato, S, ne rek.)



**~io**: branĉo de meteologio pri altaj aertavoloj
**~ia servo**: regula informservo pri veterprognozo
**Aerodromaj meteaj minimumoj**: lokaj statistikaj grandoj
**Aeronaŭtiko**: scienco pri aerveturado
**~a klimatologio**: branĉo de klimatologio aplikata al aviado
**~a meteologio**: branĉo de meteologio aplikata al aviado
**Agocentro**: regiono kiu determinas la vetertipon
**Agro**: kultivebla kampo
**~meteologio**: branĉo de klimatologio aplikata al agrokulturo
**~klimatologio**: studo pri klimata influo je agrokulturo
**Akrecio** (N): alkresko de malmola depozito (A: accretion)
**Aktin-**: pseŭda prefikso pri sunluma radiado
**~aj radioj**: kemiaktivaj sunaj radioj
**~ometro = pirheliometro**: mezurilo por sunluma potenco
**Akustiko metea**: branĉo de fiziko pri sonfenomenoj en atmosfero
**~aj sondajoj**: esploro de altaj tavoloj pere de sonondoj
**Akvo** (PV): likvaĵo en maroj kaj riveroj
**~a vaporo**: akvo gasiĝinta pro varmiĝo
**Akvozeco de nuboj**: proporcio de akvoenhavo en nuboj
**~o de la atmosfero**: proporcio de akvoenhavo en la aero
**Akvokolekta tereno**: pluvdrena baseno
**Akvodividiĝo**: altaĵo inter najbaraj drenbasenoj (G: Wasserscheide)
**Albedo** (S): lumreflekta koeficiento
**Alidado** (S): turnebla parto de angulmezurilo
**Alto relativa** (PV): vertikala distanco super iu baza nivelo
**~o absoluta**: vertikala distanco super la marnivelo
**~apremo = alto permesata mallongigo)**: regiono de anticiklono
**~a maro**: maro kun ondiĝo de indico 6
**~ometro** (S): mezurilo de aviadila alto super marnivelo
**~oelektrografo**: aparato por studo de elektra ŝarĝo en nuboj
**~okumuluso**: ondaspekta rondnubeta ĉielkovraĵo (A: mackrel sky)
**~ostratuso**: stria vuala, travidebla nubo
**efika ~o de anemometro**: ekvivalenta ~o super tereno

**Altitudo** (S): angulo de ĉiela aŭ enaera korpo super la horizonto
**Ambia** (N): kompara kun la ĉirkaŭa medio (A: ambient)
**Ambosnubo** = **pseŭdociruso** : supra disfluanta parto de kompakta kumulonimbusa nubo (L : incus) (A : anvil)
**Amplitudo** : ĉiuflanka maksimuma devio de mezvaloro
**Ampolo** (PV): likvujeto de termometro
**nigr~a termometro** : solariza termometro por mezuri sunradiadon
**du~a termometro** = **psikrometro**: termometro kun seka kaj malseka ampoloj
**Anabata vento** (S): dekliva ascenda vento, pelata per malvarma fronto
**Analizo** (S): diagnoza esplorado de observita veterstato
**aeramas~o** : diagnozo de probabla evoluo de aeramasoj
**Analobara arco**: regiono de kreskanta aerpremo
**Analogometodo**: dedukto de similaj situacioj (A: analogy)
**Anemo-** : pseŭda prefikso pri ventorapido
**~skopo**: ventoflageto aŭ ventomaniko
**~metro portebla** (PV): ilo por mezuri ventoforton
**~grafo**: registrilo de ventorapido kaj direkto
**~gramo** (S) : registrilfolio de anemografo
**~logio** (S): branĉo de meteologio pri vento
**~biagrafo** (S) : registrilo de vertikala ventkomponento
**~metrio** (S): branĉo de meteologio pri mezurado de ventorapido kaj -direkto
**Anerojda barometro** (S): ilo por mezuri aerpremon pere de elasta vakutubeto
**~ografo** = **barografo**: registrilo de aerpremo
**Anstromo** (S) : unuo de luma ondolongo. 1 Å = $10^{-7}$ mm
**Angulrapido**: angula ŝanĝo de direkto en unu sekundo
**Anomalio** (PV) : devio de normaleco ĉe iu fenomeno
**~a sonpropago**, **~a** radiopropago: propagoj neegalaj diversdirekte
**Antarkto** (PV): sudpolusa regiono de la terglobo
**~a fronto**: antaŭa surfaco de sudpolusa aerfluo
**~a aŭroro** = aurora australis (L)
**Antarktiko** (S): sudpolusa kontinento
**Anti-**: prefikso pri kontraŭeco de pozicio aŭ movo (kp. kontraŭ)
**~ciklono** (S): regiono de alta premo rilate al ĉirkaŭaĵo
**~ciklona baro**: obstaklo al ciklona cirkulado



**~krepusko**: postkrepuska lumzono en eosta parto de la ĉielo
**~pasato**: vento kontraŭdirekta al pasato k superfluanta ĝin (A : anti-trades)
**~helio**: kontraŭsuna lummakulo en la sama ĉiela altitudo
**~seleno** (S): kontraŭluna lummakulo en la sama ĉiela altitudo
**~tripta vento**: vento fluanta en direkto de la premgradiento
**Antropoklimatologio** (S): scienco pri interrilato de homo kaj klimato
**Aplikata meteologio**: metea studo kun praktika celo
**Appleton-tavolo** = **E-tavolo** : parto de jonosfero 250 ĝis 400 km alta
**Arajometro** (S) : densometro por fluidaĵo (A : areometer)
**Areolo** (S): lumanta spaco ĉirkaŭ lumfonto
**Arido** (N): akvomanko en atmosfero kaj grundo
**absoluta ~o**: senpluva klimato
**parta ~o**: malmultpluva klimato
**~a zono** = **dezerto**: senplanta regiono
**indeksoj de ~eco**: klasifikoj laŭ diversaj aŭtoroj
**Arĝenta jodido** : kemiaĵo ŝprucigata en nubon por instigi pluvon
**Arkto**: nordpolusa regiono de la terglobo
**~a aero**: speco de aeramaso, kiu venas rekte de la norda poluso
**~a aŭroro** = Aurora borealis (L)
**~a marfluo**: frida marfluo devenanta de nordpolusa regiono
**~a fronto**: nekontinuo inter arkta kaj depolusa aerfluoj
**Arko** : kurbaspekta fenomeno; ekz.: ĉiel~o, pluv~o, nebul~o
**~a skvalo** : skvalo karakterizata per nubarko
**Arkuso**: kumulonimbusa rulnubo, nubarko (A: rollcloud)
**Ascendi** (S): supreniĝi
**~a aero**: supreniĝanta aerfluo
**~a vento** : anabata vento k.a.
**~degelo** : degelo propagiĝanta supren laŭlonge de deklivo
**Aspiratoro** = **enspirilo** (pref.) : rotacianta parto de iu speco de psikrometro
**Atlaso klimatologia**: maparo pri klimataj elementoj

**Atmometro** (S) = vaporiĝometro: ilo por mezuri elvaporiĝan rapidon
**Atmosfero** (PV): ĉirkaŭtera aertavolaro
**~o adiabata**, homogena, izoterma, politropa, alta, meza, k.a.
**normala ~o**: teoria ~o kun difinitaj valoroj
**~a elektro**: fenomeno, kiu kaŭzas tondron, fulmon kaj aŭroron
**~a malpuro**: eroj de polvo, fumo kaj planktono (kp. aerosolo)
**~aj tajdoj**: malfortaj dumdiurne variiĝantaj aerpremoj
**~aj perturboj**: neregulaĵoj en aerfluo, ŝtormoj
**~a cirkulado**: tridimensia venta sistemo ĉirkaŭ kaj super la terglobo
**~a premo normala**: aerpremo ĉe marnivelo, egala al 1013 mb
**~ologio** (S): scienco pri rilato de ~o al vetero
**~ografio** (S): scienco pri rilato de ~o al tera vivo
**~aĵoj**: (S, ne rek.) = atmosferaj radioperturboj (pref.) (A: atmospherics) (kp. sferikoj)
**Aŭdeblo anomalia**: neregula sonpropago diversdirekten zonoj de ~o aŭ silento
**Aŭguro**: antaŭsigno pri okazonta vetero, ekz. ĉielruĝo, ĉevalvostaj nuboj, k.a.
**Aŭroro** (PV): ĉielluma radiado pro elektra ŝarĝo
**~arkta**: Aurora borealis (L)
**~antarkta**: Aurora australis (L)
**~konstanta**: nokta lumflagreto de ĉielo
**~matena**: apudhorizonta ĉielruĝo dum sunleviĝo (G: Morgenröte)
**~vespera**: apudhorizonta ĉielruĝo dum sunsubiro
**Aŭtokonvekcio**: spontanea vertikala aerfluo
**Aŭtuno**: jarsezono inter somero kaj vintro
**Averaĝo**: mezvaloro
**Averto** (PV): antaŭsciigo pri danĝero
**aviada ~o**: prognozo pri danĝeraj flugkondiĉoj
**ŝtorm~o**: avizo pri okazonta ŝtormo
**Aviado**: flugarto
**veter~ilo** (S): aeroplano kun meteografoj
**Azimuto** (S): angulo inter aerflua direkto kaj meridiano



# B

**Bagujo**: ĉiklono en Filipina insularo
**Balistiko** (PV): scienco pri trajektorioj de pafitaĵoj
**~a**: konstanta ekvivalenta valoro de meteo laŭlonge de la trajektorio, ekz. aerdenso, vento, temperaturo
**Balono** (PV) = aerostato: gasplena ŝvebanta sfera aŭ cilindra ŝtofa sako
**libera ~o**: balono ne ankrigita al la tero
**halta ~o** (S) = kajto: balono ankrigita al la tero
**direktebla ~o**: motorhelice pelata cilindra ~o
**pilot~o**: kaŭĉuka baloneto 50 cm diametre, uzata por ventesplorado
**sond~o**: kaŭĉuka baloneto ĝis 2 metroj diametre kun radioaparatoj, uzata por esploro de supra atmosfero
**Bankizo** (PV): vasta ĉepolusa glacikampo
**Baro**: averaĝa tutatmosfera premo = 1013 mb = 750 mm Hg
**mili~o**: praktika unuo de aerpremo, simb. "mb"
**Baro-**: pseŭda prefikso pri aerpremo
**~grafo** (PV): registranta barometro
**~skopo** (PV): hejma montrilo de premŝanĝoj en atmosfero
**~klina kampo**: aeramasa kampo en kiu la grafikaĵoj kliniĝas al la izobaroj
**~tropa kampo**: aeramasa kampo en kiu la grafikaĵoj paralelas al la izobaroj
**Barometro** (PV): mezurilo de aerpremo, hidrarga aŭ anerojda
**~a tendenco**: trihora vario de aerpremo
**Fortin ~o**: ~o kun konstantnivela ujo kaj ĝustigebla nulo
**anerojda ~o**: ~o kun elasta vakutubeto
**fiduca temperaturo de ~o** (N): senekarta temperaturo ĉe iu difinita alto
**~a karakterizo**: indekso pri ŝanĝoj de aerpremo
**Barotermografo**: registrilo de temperaturo kaj premo
**Benard-ĉelo**: konvekcia ĉelo okazanta dum surfaca fridiĝo aŭ varmiĝo de likvaĵo
**Bildo de la veterstato** = vetermapo: ĝenerala inferenco pri vetera stato
**Bio-**: prefikso pri vivaĵoj, ankaŭ bionto-

**~meteologio** = ~klimatologio (pref): scienco pri klimata influo je vivkondiĉoj
**Biro** (N): laŭangula serĉo pri pozicio (A: bearing) (G: Peilung)
**ŝtorm~ado** : laŭangula lokalizo de ŝtormo pere de radio
**~ometro** = radiobirilo = radaro: aparato por esplori la direkton kaj distancon de objekto
**Biŝopringo**: ĉirkaŭsuna korono
**Bizo** (S): malvarma vento en la Mediteraneo
**Blinko** (N): ennuba respeguliĝo de glacio
**Blizardo** (N) : forta neĝoŝtormo en Ameriko kaj Antarktiko
**Blokago** = **kontraŭago**: obstaklo al ciklona cirkulado
**~a anticiklono** : obstaklo al disvolviĝo de serio da ciklonoj
**Bloksamo** (N): statistika kurbadaptiga metodo laŭ Bloxam
**Bofort** = **Beaufort**: familia nomo
**~a veterindekso**: litera signaro por veterelementoj
**~a ventindekso**: numera difino de ventoforto, kun indicoj 0 ĝis 12
**Bolido** (PV): meteoro postlasanta en la aero luman trenaĵon (kp. aerolito) (A : shooting star)
**Bolpunkto de akvo**: 100° C ĉe normala premo
**Boleometro** : mezurilo de etaj altfrekvencaj kurentoj pere de temperaturaj ŝanĝoj (A : bolometer)
**Borao** (N): frida dekliva ventego en Suda Eŭropo (A: Bora)
**Borasko** (S): ventega vetero kun pluvo kaj neĝo (F: Bourasque)
**Borealo**: frida vetero en moderaj zonoj
**Bouguer (Buge)-haloo** : ekstera blanka ringo de Brocken-fantomo
**Boys-kamero**: fulmfotografilo laŭ Boys
**Bravaj ventoj** : vestraj ventoj en moderaj latitudoj (G : Brave Winde) (A : Brave west winds kaj Roaring Forties)
**Brilo**: forta lumelsendo
**trem~o**: ŝajntremo de surtere vidataj objektoj
**verda ek~o**: subita verdiĝo de la supra sunrando en tropikaj landoj
**Brita Somera Tempo (B.S.T.)**: horloĝa tempo 1 horon antaŭenigita de Grinviĉa Meza Tempo (G.M.T.)
**Brizo** (N) : regule okazanta milda konvekcia vento, ekz. mar~o, marborda ~o, gleĉera ~o, k.a.
**dekliva ~o**: vento ĉe montflanko, anabata aŭ katabata
**Brocken-fantomo**: ennebula miraĝo de propra ombro
**Bronto-** : pseŭda prefikso pri fulmotondro
**~logio**: scienco pri burkoj
**~metro** : mezurilo de fulmotondraj fenomenoj
**Brückner-ciklo**: 35-jara humidvetera ciklo
**Brumo** (S) : malseka nebuleto, videblo 1000-2000 metroj (F: brume) (A: mist)
**Bulteno metea**: perioda veteravizo, skriba, parola, grafika
**Burano** (N): malvarma ventego en Azio
**Burko** (N): ŝtormo kun fulmo kaj tondro
**Burstero** (N) : ventego en Aŭstralio
**Buys Ballot-leĝo**: regulo pri ventodirekto en la suda kaj norda hemisferoj

## C

**Celio** (N): superterena alto de nubbazo (A: ceiling)
**Celimetr-o** (N) : ilo por mezuri nubbazan alton (A : ceilometer)
**Celsiusa termoskalo**: kutima skalo ĉe termometro
**Centro de efiko** = agocentro: regiono kiu determinas vetertipon
**Cianometro**: mezurilo de ĉielkoloroj
**Ciklo** (PV) : periodo de kompletiĝo de serio da fenomenoj
**~ostrofa vento** = **gradienta vento** : komponento devenanta de vojkurbiĝo de aeramaso
**Ciklono** (PV): regiona malaltaprema sistemo kun maldekstruma aercirkulado en la norda hemisfero
**anti~o**: regiona altaprema sistemo kun dekstruma aercirkulado en la norda hemisfero
**~genezo** = **ciklondeveno** (S): origino de ciklono
**~olizo** : dissolviĝo de ~o (Ciklolizo, S, ne rek.)
**~a pluvo**: pluvo kaŭzita de pasanta malaltaprema regiono
**inter~a selo** : regiono inter 2 altoj aŭ 2 malaltoj (A : col)
**Cirkulado** (PV): rondira fluo
**atmosfera ~o**: sistemo de aeramasa moviĝo sur tuta terglobo

**~a indekso:** polusa, subtropika, meridiana, ciklona, anticiklona, tutgloba, k.a.
**Cirkum- :** pseŭda prefikso pri ĉirkaŭigo, ekz. ~horizonta, ~ĉiela, k.a.
**~zenita arko:** malvasta difrakta lumringo ĉirkaŭ zenito
**Cirostratuso:** hela vuala nubo, simb. "Cs"
**Cirokumuluso:** hela kompakta nubo, simb. "Cc"
**Ciruso** (PV): hela maldensa nubo, simb. "Ci"
**Coriolis :** familia nomo, vd. Koriolaj fenomenoj
**Cunamo** (N) : Postsisma altega marondiĝo (A : tidal wave) (Japane : tsunami)

## Ĉ

**Ĉapnubo = Pileuso** (N) : kapuĉoforma nubo super kumuluso (L : Pileus)
**Ĉelo :** vastvolumena aeramaso komune influata
**Ĉevalvostaj nuboj:** plumformaj cirusoj
**Ĉielo** (PV) : supertera spaco
**~a lazuro:** blua koloro de ĉielo
**~arko:** arko kolorata pro lumrefrakto
**~okono :** frakcia indico uzata por difini nubkovriĝon de la ĉielo
**~stata indekso:** klasifiko de nubozeco kun frakciaj indicoj 1/8 ĝis 8/8
**klara ~o :** ĉielo nubkovrita ĝis indico 2/8
**tutnuba ~o :** ĉielo nubkovrita kun indico pli ol 6/8
**rondnubeta ~o:** ĉielo kun ondaspektaj kumulusoj (A: mackrel sky)
**Ĉifraro:** konsentita signaro precipe telekomunika
**Ĉiklono** (N) : ensuĉa malgranddiametra fortega ciklono en tropika zono (A: whirlwind)
**~aj ŝtormoj :** tifono, bagujo, tornado, k.a.
**Ĉinuko:** varma vento en Roka Montaro
**Ĉionografo** (S): registrilo de neĝokvantoj

## D

**Degelo** (PV): reakviĝo de glacio sur rivero kaj grundo pro varmo (A: thaw)
**Dekliniĝo magneta** (S): angulo inter magneta kaj geografia meridiano
**Deklivo** (PV) : klinita tereno
**~a vento** (S): anabata aŭ katabata vento kaŭze de varmiĝo de deklivo



**~a degelo:** malglaciiĝo propagiĝanta malsupren
**Dekstruma ventoŝanĝo = ĵiro** (N) (A: veering)
**Denso** (PV): maso en unuo da volumeno
**aer~o:** maso en unuo da aera volumeno
**~ometro** (S) : mezurilo de specifa pezo de neĝo
**Depozito** (N) : kondensita tavolo de amasiĝintaj solideroj
**Depresio** (PV): regiona malaltapremo
**branĉa ~o:** neĉefa ~o sekvanta la ĉefan
**Descenda aerfluo = aergliso :** klina malsupreniĝo de aeramaso
**Devio** (PV): devojiĝo el normala pozicio aŭ direkto
**~o de vento:** diferenco inter direkto de surfaca vento kaj izobaro
**probabla ~o:** ofte okazanta devio
**Dezerto** (PV): arida senplanta regiono
**Diafana** (PV): tralumigebla, sed ne travidebla
**Diagnozo** (S): konkludo farata el observitaĵoj
**Diagramo** (PV): grafika desegno montranta interrilaton de valoroj (A: chart)
**aerologia ~o:** grafiko pri supraj aertavoloj
**map~o :** mapo kun surdesegnitaj linioj de egalvaloroj
**Diatermanco :** travarmeblo (A : diatermancy) (kp. diatermo, S)
**Difrakto** (PV) : deviiĝo de lumradioj, pasantaj el unu medio en alian (G: Beugung)
**~aj fenomenoj:** korono, Biŝopringo, k.a.
**Difuzo metea** (PV): ĉiudirekta propago (A: scattering)
**~o** luma, radia, gasa, fronta, k.a.
**Dilatiĝo** (PV): linia aŭ volumena plivastiĝo de substanco
**Diluvo :** degelo dum glaciara praepoko (biblia inundego) (A: flood)
**Dino** (S): fizika unuo de forto
**Dinamiko** (PV): branĉo de mekaniko pri fortoj kaj movoj
**~a meteologio:** scienco pri atmosferaj movadoj
**~a fridiĝo:** fridiĝo kaŭzata per ekspansio de la aero
**Direkto** (PV): alcela linio aŭ vektoro
**~oskopo = birilo (kp. radaro)**
**laŭkompasa ~iĝo:** orientiĝo pere de kompaso (A: orientation)
**Disfluo:** diverĝo de izolinioj, ekz. izobaroj aŭ izohipsoj

**Disglaciiĝo**: printempa dispeciĝo de glacitavolo (F: débâcle)
**Diurno** (PV): 24-hora periodo
**~aj varioj kaj inter~aj varioj**: ofte uzataj periodoj por statistikaj komparoj
**Diverĝo** (S): horizontala larĝiĝo de aerfluo, malproksimiĝo de izolinioj (kp. konverĝo)
**Do-faktoro**: diferenco inter la ekzakta kaj observita altoj de aviadilo
**Doktoro** = **Harmatano**: vento malhumida en subtropika Nordafriko
**Doldrumo** (N): zono de ekvatora kalmo kun oftaj ŝtormoj inter la 2 pasataj zonoj (A: doldrums)
**Dreni** (PV): forigi akvon el grundo per subteraj tuboj
**~baseno**: regiono kolektanta precipitakvon
**~dividiĝo**: terena altaĵo inter drenbasenoj (A: watershed)
**Drizelo** (N) = **nebulpluvo**: densa precipito de etaj gutoj (A: drizzle) (G: Rieseln)
**~eto** = **montara drizelo**: nebulo portanta nedensajn gutetojn (A: Scotch mist)
**Drivi** (PV): flosi laŭ puŝo de akva aŭ aera fluo (A: drift)
**neĝ~aĵo**: amasiĝo de kunblovita neĝo (A: snowdrift)
**neĝ~o**: aero plena de ŝvebantaj neĝeroj (A: drifting snow)
**Drosometro** (S) = rosometro (pref.)

## E

**Ekarto** (PV): diferenco inter la ekzakta kaj observita grandoj
**~ologio**: scienco pri probablo de neekzaktecoj
**persona ~o**: kutima neekzakteco farata de observisto
**~oleĝo** = **Leĝo de Gaŭsa distribuo**: reguleco en distribuo
**Eĥo** (PV): reflekto de sono aŭ radia impulso de distanca objekto
**Eklipso** (PV): ŝajna malapero de astro
**~a vetero**: subita fridiĝo pro foriĝo de sunradioj
**~aj influoj**: dumeklipsaj varioj optikaj, aerpremaj, k.a.
**sun~o**: kovro de sunfaco per la malhela lundisko
**lun~o**: eniro de luno en la terombron



**Eksikatoro** (S): sekigujo kun higroskopaĵoj
**Ekzosfero**: ekstrema supra atmosfera tavolo, pli ol 800 km alta
**Ekspansio** (PV): plivastiĝo de gaso pro malpremiĝo aŭ varmiĝo
**linia ~o**: unudirekta plilongiĝo
**volumena ~o**: spaca pligrandiĝo
**Eksponi** (PV): elmeti al influo de eksteraj fortoj
**Ekstremoj** (PV): maksimumaj kaj minimumaj grandoj de meteoj
**lokaj ~oj**: ekstremaj observitaĵoj en iu regiono
**aerodromaj ~oj**: ekstremaj observitaĵoj karakterizaj al iu aviadejo
**absolutaj ~oj**: longperiode okazantaj ~oj
**Ekvatoro** (PV): tergloba cirklo egaldistanca inter la polusoj
**~a aero** = **tropika aero**: venanta el malaltaj latitudoj
**~a kalmo** = **doldrumo** (N): zono de ventostagno inter la pasataj zonoj
**Ekvi-**: prefikso pri egaleco
**Ekvinokso** (PV): dato de taga kaj nokta egaldaŭro.
**Ekvivalento** (PV): anstataŭebla egalvaloro
**~a konstanta vento**: balistika meza ventrapido laŭlonge de la trajektorio
**~a potenciala temperaturo**: balistika meza temperaturo laŭlonge de la trajektorio
**Elektro** (PV): formo de fizika energio
**atmosfera ~o**: ~a ŝarĝo en nuboj aŭ atmosferaj tavoloj
**precipita ~o**: elektra ŝarĝo en falantaj pluveroj
**~ometro**: ilo por mezuri potencialan diferencon
**~oskopo**: montrilo de ekzisto de potenciala diferenco
**alto~ografo**: registrilo de nuba elektra ŝarĝo
**~ometeo**: fulmo, tondro, k.a.
**Elementoj de meteologio** = **meteoj**: temperaturo, aerpremo, vento, precipito, humido, nebulo, nubo, k.a.
**Elma fajro**: intermita senfulma nublumiĝo (A: Et Elm's fire)
**Emagramo**: termodinamika diagramo pri supraj aertavoloj

**Energio** (PV): fizika forto kapabla je laboro
**~a balanco,** transformiĝo, distribuo, ekvacio, k.a.
**Entropio** (S) : termodinamika grando pri energio
**Eosto** (N) : kompasa direkto, (kp. oriento); (G : Osten); (A : east)
**Erozio** (PV): forfrotado de tersurfaco kaŭzata per meteoj
**Etezioj**: someraj nordaj ventoj ĉe la eosta Mediteraneo
**Etrioskopo** (S) : termometro por spacradioj, (kp. pirheliometro)
**Eŭler-transformigo**: matematika procedo
**Eŭler-vento** : ciklostrofa vento kaŭzata de aera akceliĝo
**Evagramo**: termodinamika diagramo
**Evaporado** = elvaporiĝo (pref.)
**Evapotranspirado** : vaporiĝo de akvo el la tero kaj la vegetacio kune

## F

**Factavolo**: aerpartoj en kontakto kun korposurfaco
**Fahrenheit-termoskalo** ne estas ofte uzata por scienco
**Fali**: akcepti pli malgrandan valoron
**Falperiodo de barometro**: ĝustiga daŭro dum ŝanĝo el klina al vertikala pozicio
**Fatamorgano** (N): multobla miraĝo videbla en dezerto
**Fazo**: momenta stato de iu perioda fenomeno, ekz. de angulo, de pozicio
**~o luna**: perioda aspektoŝanĝo de la luno (A: phase)
**Fenologio** (N) : scienco pri sezonaj influoj je vivaĵoj (A : phenology)
**Fenomeno** (PV) : neofte okazanta meteo
**Fiduca** (N) **punkto** : referpunkto ĉe iu skalo, ekz. 100° C, 760 mm premo, k.a.
**~a temperaturo de barometro** (N): kompensa senekarta temperaturo ĉe iu difinita premo
**Filtri** (PV): trafluigi likvon por purigi ĝin
**tra~iĝo = vd. perkolato**
**Firno** (N) : neĝo firmiĝinta al glacikernoj (F : névé) A : firn)
**Flagnubo** : senmova nubo super montpinto ekz. helmnubo
**Floti** (S) : resti sur akvo ne mergiĝante (A : to float)
**~forto** (S): vertikala premo de fluidaĵo al objekto (A: buoyancy) (G: Auftrieb)



**Flui** (PV): samdirekte moviĝi (nur pri fluidaĵoj)
**~rapido**: fludistanco en unuo de tempo
**~kirlo**: rotacianta parto de fluo, turbulento
**~vojo** : samdirekta propago de aera aŭ akva amaso, (kp. trajektorio)
**~ego** : konstanta telefluo en maro aŭ oceano, ekz. Kuroŝivo, Golfa fluo
**~linia movo** (S): = lamena fluformo: regula fluvojo flanke de obstaklo (A: streamline)
**for~o** : dreniĝa volumeno de precipito (A : run off)
**Fluida** (PV): malsolida, facile fluanta
**Fluoreski** (PV): kolore lumi dum ekspono al malpli longaj ondoj
**Fluso**: periodo de tajdo kiam la maro altiĝas (A: flow)
**mal~o**: periodo de tajdo kiam la maro malaltiĝas (A: ebb)
**Foeno**: varma deglisa vento (Feno, PV, ne rek.) (G: Föhn)
**~efiko** : fenomeno kiu kaŭzas sekiĝon de la aero kaj sennubiĝon de la ĉielo
**Fortin-barometro**: hidrarga barometro kun ĝustigebla nulpunkto
**Fosforesko** (PV) : postlumiga senkalora elsendo de lumradioj (kp. luminesko)
**Foto-** : pseŭda prefikso pri lumo aŭ ekspono al lumo
**~metro** (PV): mezurilo de luma intenso
**~telegrafio** (PV) : elektraonda bildigo de meteoj kaj fenomenoj
**~meteo**: optika atmosfera fenomeno
**Fourier-serio**: matematika prezento de serio de trigonometriaj funkcioj
**Frakto-** : pseŭda prefikso pri nubdispeciĝo
**~stratuso, ~kumuluso, ~nimbuso** (vd. skudoj) (A: scuds)
**Frekvenco** (PV): nombro de fenomenaj cikloj en unu sekundo
**Frido** (S): fizika stato de subnula temperaturo ĉe normala aerpremo
**~a punkto**: temperaturo de akva glaciiĝo (A: freezing point)

**dinamika ~iĝo**: fridiĝo pro aera ekspansio aŭ malpremiĝo
**~a fronto**: surfaco de atako de malpli varma aera ondo
**~a ondo**: subita termofalo pro frida aeratako
**~a sektoro**: parto de ciklono okupata de frida aerfluo
**~aj zonoj**: terpartoj ĉirkaŭataj de la arktaj cirkloj
**sub~iĝinta pluvo**: pluvo kun neglaciiĝintaj gutoj de subnula temperaturo
**postflua ~a fronto**: neĉefa sekvanta aerfluo

**Frikcio**: frotforto inter aerfluo kaj tersurfaco, aŭ inter diversaj aerfluoj
**~a** alto, forto, koeficiento, spiralo, rezisto, ktp.

**Fronto** (S): surtera linio de disiĝo inter diverstermaj aeramasoj
**varma ~o**: antaŭa surfaco de varma aerfluo
**malvarma ~o**: antaŭa surfaco de malvarma aerfluo
**pasata ~o**: fronto inter du subtropikaj anticiklonoj
**maskita ~o**: fronto ne montrebla en la terma mapdiagramo
**skval~o**: longa linio de skvaloj
**branĉa ~o**: fronto sekvanta la ĉefan fronton
**intertropika ~o**: fronto inter tropika kaj ekvatora aeramasoj (disigas musonon de harmatano en Afriko)
**~ogenezo**: procedo de formiĝo de du diverstermaj aeramasoj
**~olizo**: procedo de nuliĝo de fronto

**Frosto** (PV): vetero kun subnula temperaturo
**~a tago**: tago kun maksimuma temperaturo de 0° C
**kontraŭ~a ŝirmo**: rimedo por protekti rikoltojn kontraŭ frosto (hejtado, kovranta fumo k.a.)
**disradia ~o** (S): frosto kaŭzata de tera fridiĝo (A: radiation frost)
**ter~o**: grunda glaciiĝo
**perma~o** (N): konstanta frideco de grundo en tundro
**~sanktuloj**: St. Bonifacius, St. Gervasius, St. Mammeritius, St. Pankratius
**~opunkto**: saturiĝa temperaturo de humida aero en kontakto kun glacio (A: frostpoint)

**Fulmo** (PV): fenomeno de elektra malŝarĝo internuba aŭ inter nubo kaj tero



**zigzaga ~o**: rompata lumlinio inter nubo kaj tero
**stria ~o**: rubandaspekta lumlinio
**globa ~o**: lumanta sfero ŝvebanta en aerfluo
**raket~o**: raketforma ~o
**tavola ~o**: senlinia interna lumiĝo de nuboj (A: sheet lightning)
**tele~ado**: sentondra distanca lumiĝo de nuboj kaj de ĉielo apud horizonto (A: heat lightning)
**gvida ~ofrapo**: elnuba fulmgvida linio (A: leader stroke)
**revena ~ofrapo**: kontraŭira fulmlinio (A: return stroke)
**~aĵo**: **fulmoŝtono** (A: thunderbolt)
**~suĉilo**: pinta kondukilo de atmosfera elektro teren

**Fumo** (PV): speco de vapora nebulo kun nebruligita karbopolvo
**arkta mar~o**: advekcia supermara nebulo

**Funelo**: parto de tromba kolono
**~nubo**: nubo ĉe mezo de tornado

**Fuzo** (N): intermerdiana segmento de 15° da longitudo rilate al najbaraj fuzoj (F: fuseau)

## Ĝ

**Gaso** (PV): aersimila fluida ŝtofo
**~ospaco**: enhava volumeno de balono

**Gaŭso** (S): unuo de magneta indukto
**~a distribuo**: plej ofta, simetria ekartoleĝo

**Geo-**: pseŭda prefikso pri la tergloba krusto
**~dinamika metro**: unuo por mezuri geopotencialon (1 gd.m. = $10^5$ ergoj)
**~terma profundo**: grunda profundo de kie temperaturo komencas altiĝi je 1° C
**~fiziko**: branĉo de fizika scienco pri la terkrusto kaj atmosfero
**~sfero**: kompleta terkrusto
**~magnetismo**: magnetismo kaŭzata de elektraj terkurentoj
**~strofa vento**: ventkomponento kaŭzata de la tera rotacio
**ne~strofa vento**: ventkomponento influata de gravito
**~potencialo**: potencialo de pezpovo rilata al marnivelo
**~potenciala metro**: unuo por mezuri geopotencialon (1 gp.m = 0,98 gd. m.)

**Genezo**: pseŭda sufikso pri deveno kaj evoluo, ekz. fronto~o, ŝtormo~o, ciklon~o, k.a.
**Glacio** (PV): akvo solidiĝinta pro frido
**~a praepoko**: geologia epoko de malalta temperaturo
**~kovro**: maldika glacitavolo sur grundo (A: icecover)
**~tegmento**: dika tutakovraĵo de kontinento (A: ice-sheet)
**~kerno**: eta ~kristalo
**~floso**: vasta flotanta glacikampo (A: floe) (kp. bankizo)
**gruz~o** (N): dispeciĝinta glacio (A: frazzle ice)
**dis~iĝo** (N): ~kreviĝo: printempa dispeciĝo de glacitavolo (A: débacle)
**~blinko** (N) = **blinko** (N) (pref.): ennuba respeguliĝo de glacio
**~monto**: vasta flotanta glacibloko (A: iceberg)
**~umo**: glacitavolo super aviadila surfaco (A: icing)
**de~umigo**: forigo de glacitavolo de aviadila surfaco (A: deicing)
**~iĝinta neĝo** = **firno** (N) (A: firn)
**~iĝinta roso** = **rejfo** (N) (A: rime) (G: Reif)
**~iĝinta nebulo** = **prujno** (PV) (A: hoar frost)
**~nebulo**: aero plena de ŝvebantaj glacieretoj (A: icemist)
**~prismoj** (N): precipito de etaj glacieroj ne disbranĉiĝitaj (A: ice needles)
**Glatiso** (N): superglaciiĝo de grundo (A: glazed frost) (G: Glatteis)
**Glaisher-stativo**: stativo por eksponi termometron
**Glecero** (N): konstanta glacitavolo en valoj inter montoj (G: Gletscher)
**~a brizo**: malvarma vento sur ~a deklivo
**Gliso** (N): senfrikcia movo de ia korpo (aeramaso) sur surfaco de alia korpo (aeramaso)
**aero~o**: klinita fluo de aeramaso supren aŭ malsupren
**~a surfaco**: surfaco de klinita intermovo de aeramasoj
**Glitkalkulilo pilotbalona** = **kalkulstango**: aparato por kalkulado de altaj ventrapidoj
**Glitskalo de Gold**: skalo de termometro fiksita al marnivela barometro
**Globfulmo**: sferforma koncentriĝo de elektra energio
**Golfa fluo**: transatlantika marfluego



**Goniometro** (S): ilo por mezuri klinangulon inter du surfacoj
**Grado** (PV): dividero de iu aparata skalo
**termo~o** laŭ Celsius, Réaumur, Fahrenheit, Kelvin
**~otago**: unuo por komparo de ĉiutaga temperatura variado (A: degree day)
**Gradiento** (S) (ĝenerala nocio): vario de iu elemento laŭ unuo de longo en difinita direkto
**~a vento**: vento kiu komplementas la aerpreman venton
**vertikala termo~o**: temperatura falo per unuo de alto
**aerprema ~o**: prema falo je 100 km de horizontala distanco
**Grafiko** (PV): arto reprezenti rilatojn inter grandoj per kurbaj linioj
**~aĵo** (PV) = diagramo: kurblinio esprimanta rilaton inter fenomenaj ŝanĝoj
**Grajlo** (PV): maldikgrajna hajlo (G: Frostgraupel)
**-grafo**: pseŭda sufikso pri registrilo, ekz. tele~o, anemo~o
**Gramo**: unuo de maso
**~okalorio**: unuo de kaloro
**-gramo**: pseŭda sufikso pri diagramo aŭ registrilfolio, ekz. tele~o, radio~o, ema~o, nomo~o
**Gravito** (PV): tirforto inter materiaj korpoj specife al tera centro aŭ al aliaj ĉielkorpoj
**~a** energio, ĝustigo, ondo, potencialo, ktp
**Gregalo**: vento en la Mediteraneo
**Grundo** (PV): supra tertavolo laŭ ĝiaj kvalitoj por agrokulturo
**frida ~o**: tersurfaco kun subnula temperaturo
**sur~a frosto**: falo de temperaturo al 0° C
**~ostata indekso**: indekso kun 10 numeraj indicoj por diversaj statoj de grundo
**Gruzglacio** (N): dispeciĝinta glacio (A: frazzle ice)

## Ĝ

**Ĝenerala** (PV): tutampleksa
**~a bildo**: klimata bildo laŭ vastareaj observaĵoj
**~a inferenco**: dedukto pri probabla vetera evoluo
**~a prognozo**: vastarea antaŭdiro pri vetero
**~a premŝanĝo**: vastarea kresko aŭ falo de premo (A surge)
**Ĝustigo**: normigo de aparato

## H

**Haaro**: marborda nebulo en Skotlando
**Habubo**: polvovento en Sudano
**Hajlo** (PV): precipito de glacieretoj (A: hail)
**~ero**: peco de hajlo (A: hailstone)
**~neĝo** (PV) : = **Krupio** (N) : mola hajlo (G : Graupel) (A : soft hail)
**Haloo** (PV) : lumringo kaŭzata de refrakto de radioj
**suna ~o** : kolora ĉirkaŭsuna lumringo
**luna ~o** : blanka ĉirkaŭluna lumringo
**Harmatano**: malhumida vento en Mezafriko
**Harmona analizo**: esplorado de vetermapa grafikajo laŭ Fourier
**Hazo** (N) : polva nebulo kun videblo ĝis malpli ol 1000 metroj (A: haze)
**Helio-** : pseŭda prefikso pri sunluma radiado
**~grafo** (S) = sunografo: registrilo de ĉiutaga sunhela daŭro
**~grafio** (S): telekomunika metodo pere de lumsignaloj
**Helmo**: frida eosta vento en Kumberlando
**Heterosfero** : atmosfera tavolo 100 ĝis 800 km alta
**Heaviside** (Hevisajd) -tavolo = E-tavolo : parto de jonosfero 100 ĝis 225 km alta
**Hidro-** : pseŭda prefikso pri fluidajo
**~metro**: ilo por mezuri denson de fluidaĵoj
**~metrio** (PV): scienco pri mezurado de kvanto de fluidaĵoj
**~skopo** (S): observilo de mara fundo
**~grafio** (S): scienco pri stato de maroj
**~dinamiko** (S): branĉo de fiziko pri fluo de likvaĵoj
**~meteo**: vetera elemento kaŭzata de aerhumido, ekz. nebulo, pluvo, roso
**~logio** : scienco pri kvantaj leĝoj en la hidrosfero
**~sfero**: ekvivalenta akvotavolo en la terkrusto
**Hidrarga** oscilo de barometro = piŝtonado (A: pumping)
**Hieto-** : pseŭda prefikso pri precipitaĵoj
**~grafo**: registrilo de ĉiutaga pluvokvanto
**Higro-** : pseŭda prefikso pri humido
**~grafo** (S) : registrilo de aera humido
**~metro** (PV) : ilo por mezuri aeran rosopunkton kaj humidon
**~skopo** (PV): indikilo de aerhumido



**~skopia akvo** : grunda humido ensorbita el la aero
**har~metro** : mezurilo de humido pere de ensorba harfasko
**~termometro** = Lambrecht polimetro
**Hipso-** : pseŭda prefikso pri alteco
**~metro** (S): ilo por mezuri alton pere de bolgrado de akvo
**Homosfero**: atmosfera tavolo ĝis 100 km alta kun homogena aera konsisto
**Horo** (PV): unuo de tempo
**~korekto** = horĝustigo (A: equation of time)
**sidera ~sistemo**: preciza horsistemo laŭ stela tempo
**fuza ~sistemo** : sistemo de loka tempo inter ĉiuj 15° meridianoj
**Horizonto** (PV) : cirkla limo de videbla tersurfaco
**videbla ~o**: horizonto observebla de surmara ŝipo
**~a subiĝo** (S): optika fenomeno; angulo inter horizontalo kaj videbla ~o (A: dip)
**~a ŝajnleviĝo**: optika fenomeno (A: looming)
**Humida** (PV) : vaporoza aŭ vaporkovrita (kp. seka)
**absoluta ~o**: maso de akvovaporo en unuo de aervolumeno
**relativa ~o**: grado de aera humideco
**~a aero**: aero kun pli ol 85% de relativa humido
**mal~a aero**: aero kun malpli ol 60% da humido
**~miksa proporcio** = **~ozo** : proporcio de akvovaporo al seka aero

## I

**Incido** (PV): falo de lumradio al korpa surfaco
**~a angulo**: angulo inter lumradio kaj surfaco
**Indekso** (PV): laŭorda listo aŭ tabelo, detalanta klasifikon
**Boforta veter~o**: indekso kun indicoj de majuskloj kaj minuskloj
**Boforta vent~o**: indekso kun numeraj indicoj 0 ĝis 12
**~oj** konvenciaj de arideco, marondiĝo, geomagnetismo, nebulozeco, aera cirkulado, k.a.
**Indico**: detalo de indekso, signero
**Indiki** (PV): precize montri
**~ilo**: parto de aparato movebla rilate al skalo

**~ila ekarto:** devio de ĝusta valoro pro malpreciza observo
**~ila korekto:** ĝustigo de la observita valoro

**Infraruĝa:** longonda nevidebla parto de lumspektro

**Inkremento** (N): valorkresko, aldonaĵo

**Interfero** (S): interago de lumfaskoj

**Intermita** (PV): periode interrompata

**Interpolo** (PV): takso de grando inter donitaj grandoj laŭ kalkulo, grafikaĵo aŭ tabelo

**Intervalo** (PV): intertempo aŭ interspaco

**Inversa** (PV): kontraŭa

**Inversio** (S): ŝanĝo de direkto al kontraŭa
**surfaca ~o** (S): ĉegrunda renversiĝo de temperaturo (A: ground inversion)
**vent~o** (N): pli ol 90° ŝanĝo de fludirekto inter ĉegrunda vento kaj supra aerfluo

**Inundo** (PV): subakviĝo de grundo per alta tajdo aŭ rivera superpleniĝo (A: flood)

**Irigacio** (PV): konduko de akvo al agrokultura kampo

**Irizo** (PV): delikata koloriĝo pro refrakto de lumo
**~aj nuboj:** nuboj kun diversforma koloriĝo de la randoj

**Izalobaro:** egala vario de prema gradiento
**~a vento:** ventkomponento kaŭzata de premŝanĝo

**Izalotermo:** egala vario de temperaturo

**Izo-:** prefikso pri egaleco

**Izola nubo:** nubo sen kontakto kun alia

## IZOGRAMOJ OFTE UZATAJ

| | |
|---|---|
| Izo anemono: | sama meza ventrapido |
| Izo anomalo: | sama devio el la mezvaloro |
| Izo baro: | sama aerpremo |
| Izo bronto: | sama ektondra tempo |
| Izo entropo: | sama entropio |
| Izo feno: | sama ekesto de sezonoj |
| Izo foto: | sama lumhela potenco |
| Izo geotermo: | sama surfaca temperaturo |
| Izo gono: | sama ventodirekto aŭ magneta dekliniĝo |
| Izo helo: | sama daŭro de sunhelo |
| Izo hieto: | sama precipito |
| Izo hipso: | sama geopotencialo |
| Izo humido: | sama humido |
| Izo kasmo: | sama ofteco de aŭroroj |
| Izo keraniko: | sama ofteco de ŝtormoj |
| Izo kimeno: | sama dumvintra martemperaturo |
| Izo kiono: | sama nombro de neĝotagoj |
| Izo klino: | sama magneta subkliniĝo |
| Izo maro: | sama pluvkvanto |
| Izo morfo: | sama formo de kristaloj |
| Izo nefo: | sama nubozeco |
| Izo ombro: | sama akvovaporiĝo |
| Izo pekto: | sama glaciiĝo |
| Izo pikno: | sama denso |
| Izo pleto: | sama D-faktoro |
| Izo rosotermo: | sama rosopunkto |
| Izo stero: | sama aerspaco |
| Izo tero: | sama dumsomera martemperaturo |
| Izo tako: | sama malglaciiĝo |
| Izo talanto: | sama temperatura diferenco ĉiumonate |
| Izo termo: | sama meztemperaturo |
| Izo tono: | sama osmoza tensio |
| Izo tropo: | sama eco en ĉiu direkto |
| Izo velo: | sama ventrapido |



## J

**Jaro** (PV): periodo de ĉirkaŭsuna cirkulado de la tero
**kalendara ~o:** plennombro da tagoj, 365 aŭ 366
**sidera ~o:** preciza laŭstela daŭro de tera ĉirkaŭsuna cirkulado
**~libro metea:** listo de la tutmonda staciaro (F: réseau mondial)

**Jono** (PV): rapidmova atomparto kun elektra ŝarĝo dum elektra kurento
**~osfero:** plej supra atmosfera tavolo, 100 ĝis 500 km alta

## Ĵ

**Ĵiro** (N): dekstruma ventoturno (F: Dextrogyre) (A: veering)
**mal~o:** maldekstruma ventoturno (F: Levogyre) (A: backing)

**Ĵulo:** unuo de elektra energio

## K

**Kajto** (S): halta senmotora aerodino
**~balono**: ankrigita, gasplena aerostato kun stabiligiloj
**Kalendaro** (PV): sistema divido de tempo
**~o** Gregoria, Julia
**rikolta ~o, precipita ~o**: specialaj ~oj por agronomoj
**Kalkulstango pilotbalona**: glitkalkulilo por altaj ventoj
**Kalibrigi** = **laŭnormigi**: ĝustigi al preciza diametro
**Kalino** (S): varma nebulo (A: heat mist) (H: calina)
**Kalmo** (S): kompleta senmoviĝo de aeramasoj (A: calm)
**ekvatora** ~o = doldrumo (N)
**Kaloro** (N): varmoenergio kaŭzata per movoj de molekuloj (F: chaleur)
**~balanco**: termobalanco de kaloro pro advekcio, ekz. ekvilibro de varmo devena el suno kaj tero
**latenta ~o**: ensorbata aŭ ellasata dum ŝanĝo de stato
**latenta fridiĝa ~o**: kalorkvanto ensorbata dum fandiĝo de glacio
**~metro** (S): mezurilo por la specifa kaloro necesa por altigi la temperaturon de likvajo je 1° C
**Kalorio**: mezurunuo de kaloro
**Kamsino**: varma vento en Egiptujo
**Katabata vento**: dekliva descenda vento kaŭzata de konvekcio
**Katatermometro** (S): mezurilo de kalorperdo kaj ĝia influo je homa sano
**Kaŭlo** (N): Montpinto kun konstanta glacitegmento (A: cowl)
**Kernarko**: cirkumzenita haloo, malofte observata
**Kew-barometro**: portebla barometro
**Kinematografio metea**: nubobservado pere de malrapida filmado
**Kimatologio** (S): scienco pri ondoformoj en atmosfero
**Kirlo** (PV) = **flukirlo**: rotacia fluo (A: eddy)
**~ofluo**: linio de flukirloj
**~ovento**: malvasta aerkirliĝo (A: whirlwind)
**~a viskeco**: kinetika eco de kirloflua aero
**Klimato** (PV): regiona sumo de veteraj elementoj, laŭ longtempa vidpunkto
**~ogramo**: grafika prezentado de regiona klimato
**~aj zonoj**: ekvatora, tropika, moderaj, borealaj, polusaj
**al~iĝo** (PV): kutimiĝo kaj adaptiĝo al klimataj kondiĉoj



**~oterapio**: kuracado per klimata influo
**~aj indeksoj**: klasifikoj de klimato laŭ diversaj aŭtoroj
**Klimatologio**: branĉo de meteologio, studo pri klimatoj
**matematika ~o**: studo bazita sur tera solarizo
**aeramasa ~o**: studo de vastaj aeramasoj
**megaterma ~o**: scienco pri longperiodaj devioj de klimato
**~a atlaso**: maparo pri distribuo de klimataj elementoj
**Kodo** = **leĝaro**: leĝa terminaro (ne rek.)
**Kojno de altapremo**: langforma alto inter du proksimaj depresioj (A: ridge)
**Kolono** (PV): longa vertikala formo de iu substanco
**akvo~o**: akvo levita el marsurfaco per trombo
**sablo~o**: sablo levita el dezerto per kirlovento
**Kompaso** (PV): aparato kun magneta indikilo direktita norden
**~aj direktoj**: norda (N), suda (S), eosta (E), vestra (V)
**Kompensigo** (PV): ĝustigo de aparato aŭ de grando al normo
**Konao**: kirla polvovento en Havaja insularo
**Kondenso**: ŝanĝo el vapora al likva stato
**~ajoj nevideblaj** (A: occult precipitation) (vd. spurpluvo)
**~a kerno**: humidokolekta polvero aŭ glaciero
**~iĝnivelo** = **~iĝpunkto**: temperaturo de kondensiĝo dum adiabata ekspansio
**Konstelacio** (PV): grupo da steloj
**Kontinenteco**: stabila mezkontinenta klimato pro malproksimeco al la maro
**Konteso** (N): kirliĝa nubo super la Etna deklivo (I: Contessa di vento)
**Kontraŭ-**: prefikso pri kontraŭa agado aŭ influo, ekz. ~frosta, ~venta, k.a. (kp. anti-)
**Konvekcio** (S): vertikale ascenda aerfluo pro varmiĝo de la suba tersurfaco (kp. advekcio)
**~a pluvo**: pluvo kaŭzata de ascenda aerfluo
**aŭto~o**: spontanea vertikala aerfluo
**Konvekto** (S): propago de kaloro tra likva medio
**Konverĝo metea**: horizontala interproksimiĝo de aerfluoj aŭ izolinioj (kp. diverĝo)
**Konverto** (N): transkalkulo de valoro al aliaj unuoj
**Korelativo**: interrilato de kvantoj kaj observaĵoj
**Koriolaj fenomenoj**: fenomenoj kaŭzataj de terrotacio,

ekz. ~a akcelo, forto, devio, parametro, k.a.
**Korodo** (PV) : kemia difektado de metala surfaco
**Korono** (N): koloraj ringoj pro difraktaj lumradioj (kp. krono)
**~a radiado**: energio venanta el apudsuna spaco
**~a polvo**: etaj solideroj ŝvebantaj en kosma spaco
**Kosma radiado** : radiado ricevata el ekstere de nia planedaro
**Krepusko** (PV): vespera lumŝanĝa periodo (A: twilight)
**~aj radioj**: diverĝaj lumradioj el sub la horizonto
**~a lumo** = ĉiela postlumo
**~a arko**: arko aperanta dum sunleviĝo je altitudo de 3° aŭ 4°
**~aj koloroj**: refraktaj koloroj de ĉielo aŭ montpintoj
**Kresto** = **vertekso** (N): akso de kojno de altaprema regiono en ciklona fronto
**Kriologio**: scienco pri fridiĝo de likvoj
**Krono** (PV): ĉirkaŭkapa florringo (ne rek.) (G: Kranz) (kp. korono)
**glor~o** : aŭreolo de sanktuloj (ne rek.) (A : glory) (nimbo pref.)
**Krono-** : pseŭda prefikso pri tempo kaj datoj
**~ometro**: preciza tempomezurilo (A: chronometer)
**Krupio** (N) = **hajlneĝo** (PV) : mola hajlo (G : Graupel)
**Kumuluso** (PV): kompakta nubo
**Kumulonimbuso**: tondra nubo
**Kurbo** (PV): nerekta linio
**~adaptigo**: glatigo de grafikaĵo
**ŝtorm~iĝo** (N): ŝanĝo de direkto de ĉiklona vojo
**Kurento** (PV): elektrofluo tra kondukilo
**teraj ~oj**: kurentoj en la terkrusto dum magnetaj ŝtormoj
**Kuroŝivo**: marfluego en la Japana maro
**Kvieto** (PV) = kalmo: senmoveco de aeramaso
**~a vetero**: senvento, ventostagno

## L

**Labilo** (N): nestabila atmosfero kun gradiento pli ol adiabata
**Lagrange-transformigo** (S): matematika procedo en hidrodinamiko
**Lambrecht-polimetro** : kombina higro- kaj termometro



**Latenta** (PV): kaŝita, nevidebla sed ekzistanta
**~a nestabilo**: kondiĉa nestabilo rilata al alto
**~a kaloro**: kalorkvanto ensorbata aŭ ellasata dum statoŝanĝo de medio
**Latitudo** (PV): grada distanco de iu loko al ekvatoro, ekz. alta, meza, mezalta
**Lavango** (PV): subita falo de amaso de glacio kaj neĝo el monta deklivo
**~a vento**: loka ventego post okazinta lavango
**~a pluvo** = **pluvtorento**: subita pluvego (A: cloud burst)
**Lazuro** (PV) : blua koloro de la ĉielo
**Lentoforma nubo** (S) : ĉapnubo (A : lenticular cloud)
**Lesteo**: vento en Madeiro
**Levanto**: vento en Gibraltaro kaj Kanaria insularo
**Leveĉo**: vento en Hispanujo
**Liflanko** (S): ŝirmita flanko de montaro kun malhumida klimato
**Liflanka ondaro** (S): ŝirmitaj ondoj (A: leewaves)
**Likva** (PV): flueca, malsolida
**supervarmigita ~aĵo** : likvaĵo super la vaporiĝa temperaturo
**subfridigita ~aĵo** : likvaĵo sub la frida temperaturo
**Limo** (PV): finloko de iu spaco aŭ tempo
**~ometro**: ilo por mezuri distancon al objekto (A: limit gauge)
**~ de videblo** : maksimuma distanco de klara observado per ~ometro
**Linio de skvaloj** = skvalfronto (A : linesquall)
**Lito-** (N) : pseŭda prefikso pri solidaĵo
**~meteoro** : meteoro el solidaj polveroj (A : lithometeor)
**~sfero** : ekvivalenta solida tavolo de la terkrusto
**Litro** : unuo de volumena enhavo
**-izo** : pseŭda sufikso pri nuliĝo, ekz. ciklono~o, fronto~o fronto~o
**Lizimetro** : ilo por mezuri pluvan perkolaton
**Logaritma spiralo** (PV): matematika kurbo laŭ kiu la ventrapido kreskas kun la alto
**-logo** : pseŭda sufikso pri scienculo, ekz. geo~o, meteo~o k.a.
**Loka** (PV): malvastarea
**~a horsistemo**: tempo uzata en 15° larĝa intermeridiana fuzo
**~a klimato**: klimato rilata al difinita distrikto

**Longitudo** (PV): angulo inter loka kaj Grinviĉa meridianoj
**Lumo** (PV): radiado sentebla per okulo
**infraruĝa ~o**: nevideblaj longondaj radioj en lumspektro
**ultraviola ~o**: nevideblaj mallongondaj radioj en lumspektro
**superalpa ~o**: krepuska lumiĝo de neĝkovritaj montpintoj (G : Alpenglühn).
**post~o**: postkrepuska lumiĝo de nuboj
**~aj makuloj**: enĉielaj ŝajnreflektoj de suno (A: sun dogs)
